



Bronzaĵo de LLZ, Kastelo Greziljono

Kluba Programo:**novembro:**

- 7 *Diskutvespero*. Temo: *La Estonteco de Nuklea Energio*
- 14 John Wells: *Lingva Seminario*
- 21 *Socia Vespero*
- 28 Klubanoj: *Kongresaj raportoj (kaj raportoj pri aliaj eventoj)*
(1800h: konsilantaro)

decembro:

- 5 Klubanoj: *5-minutaj prelegetoj* – temo: *Sciencfikciaĵoj kiuj Efektiviĝis*
- 12 *Zamenhofa Vespero* (gvidata de John Wells)
- 19 Neniu kunveno
- 26 Neniu kunveno

januaro 2015:

- 2 Neniu kunveno
- 9 Novjara Festo!

Aliaj anoncoj:

Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 7a decembro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.

La Zamenhofa Vespero (12 decembro)

estas la kutima festo de la LEK en la lasta kluba kunveno de la jaro, por soleni la naskiĝon de Ludoviko Zamenhof, 15a decembro 1859.

Gravaj datoj de la vivo de *Ludwik Lejzer Zamenhof* (en Esperanto: Ludoviko Lazaro), la aŭtoro de la Internacia Lingvo, konata de la nomo *Esperanto*:

15 decembro 1859 (3 dec laŭ la Julia Kalendaro tiam uzata en Ruslando) – naskiĝo en Bjalistoko (nuna Pollando, sed tiam en provinco *Granda Duklando de Litovio*, parto de la rusa imperio);

1878: unua versio de lia Lingvo projekto *Lingwe Uniwersala* estis preta, kiun li montris al studentaj kolegoj;

1879-1885: studento de medicino en Moskvo kaj Varsovio;

26 julio 1887: publikigo de nova versio de lia lingvo projekto, sub la pseŭdonimo *Doktoro Esperanto*;

9 aŭgusto 1887: edziĝo al Klara Silbernik;

1888 (Adamo), 1889 (Zofia), kaj 1904 (Lidja) – naskiĝoj de infanoj;

5-12 aŭgusto 1905: 1a Universala Kongreso de Esperanto, Bulonjo-sur-maro, Francio.

14 aprilo 1917: morto de LLZ en Varsovio.

Esperanta Kalendaro:

29 dec-3 jan: La Adiaŭa Internacia Festivalo, Jülich, Germanio, www.internacia-festivalo.de;
29 dec-3 jan: 13a Novjara Renkontiĝo, Bitburg, Germanio: www.esperantoland.org/nr
17-19 aprilo: 96a Brita Kongreso, *Jubilee Library* Brighton: <http://britakongreso.org>
25 julio-1 aŭgusto: 100a Universala Kongreso de Esperanto, Lillo, Francio: <http://uea.org/kongreso>

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:

18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,
50-52 Camden Square, NW1 9XB
(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo *London Overground*: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Matt Peperell, Olga Kerziouk, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) lek.sekretario@gmail.com;

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk,

Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com,

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Venas Zamenhofa Tago - kaj ĉe ni, Zamenhofa Vespero. Tiam oni aŭskultu kernajn skribojn, ekzemple la Kongresajn Paroladojn de la Majstro; oni kontrolu rekomendojn en liaj *Lingvaj Respondoj*; oni laŭtleĝu el la *Malnova Testamento*; oni kantu la originalajn himnojn de Ludoviko la Iniciatinto.



Sed ekzistas alia flanko de nia klasika literaturo Zamenhofa - nome, liaj gravaj tradukaĵoj de ne-bibliaj verkoj. Nuntempe, oni ial aŭdas malpli kaj malpli pri tiaj, ekzemple *Georgo Dandin* de Moliero kaj *La Rabistoj* de Ŝilero. Ĝuste tial, mi menciuj iujn el tiu kategorio. Nu, do.

La tradukarta talento de Zamenhof frape evidentiĝas en kompara legado de du aliaj teatraĵoj.

La Revizoro (el rusa originalo de Gogolo), prezentas la burokratan koruptadon de 19-jarcentaj rusprovincanoj, kvazaŭ farsaĵon de arleknaĉoj. Malgraŭ multegaj ridindaĵoj, tamen, troviĝas intenco, ke oni konsideru serioze tiujn tiamajn mankojn de honesteco kaj efikeco ĉe potenculoj.

Ifigenio en Taŭrido (el germana originalo de Goeto) tut-kontraste, rakontas tragikajn okazintaĵojn inter la gefiloj de Agamemnono kaj Klitemnestra, kun dioj kaj diinoj en la fono. Temas pri antikvaj tagoj de la greka mitologio, pli-malpli samtempe kiel la aventuroj, kiujn Homero preparolis en siaj *Iliado* kaj *Odiseo*.

Jen do du tute malsamaj verkoj, pri tute malsamaj epokoj kaj kulturoj. Ne nur tio. La vortstoko kaj stilo de la unua estas respektive konversacia kaj satira; tiuj de la dua estas deklama kaj epea. Ke Zamenhof klare, kohere kaj nuancplene tradukis ambaŭ en proprenovan lingvon restas treege mirinda atingo. Tralegu tiujn klasikaĵojn niajn - kaj juĝu mem. Kредu min, samideano: vi ĝuos la sperton.

Feliĉan Zamenhof-Tagon!

David Thornell